Jarkolekto 7 Novembro 87

# ESPERANTO EN BELGIO


! Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad) !

! de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Skotlandstrato 73 !
B-1060 BRUSELO !

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever):
La g^enerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK


ESTRARO:

Prezidanto:
Marc DEMONTY, profesoro, Schoolstr. 3, B-1710 Dilbeek

Vicprezidantoj:
Lambertine DREZE, em. s^tatoficistino, rue Louvrex 105, 4000 Liège
Ivo DURWAEL, instruisto, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem

G^enerala sekretario:
André MERTENS GOOSSENS, hon. bankestro, Priorijstr. 4, 1720 Dilbeek
Helpsekretario:
Gaston RABOSEE, rue Fosses-Berger 10, B-4641 Olne

Kasisto:
Roger DE SCHEPPER, elektroteknikisto, Doornstr. 22, B-2610 Wilrijk

Financa konsilanto:
Grégoire MAERTENS, inspektisto, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge

ALVOKO

Kandidatoj por la nova estraro estas bonvenaj: ili bonvolu sin prezenti al la nuna prezidanto tel.(02) 5693133 !
Kanditatig^oj estas riceveblaj ankaŭ dum la jarkunveno !

## NI FUNEBRAS : FORPASIS D-ro POL DENOËL, nia HONORA PREZIDANTO

Apenaŭ iom pli ol unu jaro post la forpaso de F-ino Orsolini, trafis nin nova bato pro la subita morto de unu el la plej prestiĝaj figuroj de nia movado en Belgio dum la lastaj jardekoj, nia kara samideano Pol Denoël .

Ne nur lia nelacigebla kaj multflanka agado en la movado altiris la estimon de ĉiuj, sed ankaŭ lia bonkoreco kaj homaj sentoj igas tiun perdon pli dolorige sentebla, por tiuj, kiuj iamaniere kunlaboris kun li. Lia kariero kiel kuracisto kaj lia agado kiel defendanto de la demokratio certigis al li respekton en Lieĝo, pli bone konata tamen por ni estas lia multfaceta agado en la sino de nia movado. Ĉio-ĉi respeguliĝis en la kortuŝa kaj sobra adiaŭa ceremonio de la 17-a de oktobro.

En Lieĝo mem, D-ro Denoël estis unu el la pli fervoraj aktivuloj de la grupo, kie li lernis Esperanton jam en 1931. En la sama urbo okazis la Someraj Universitataj Kursoj, al kiuj li signife kontribuis.

Kiel pedagogo, li kreis metodon praktikan kaj logikan, kiu restas utila por multaj lernantoj, kaj ĉiam dediĉis multe da atento al la instruado de la lingvo.

Li konsideris tre larĝe la limojn de sia regiono, kaj do rekte partoprenis la organizadon de la Trilandaj Renkontiĝoj, kiuj restas vojmontraj por la nuna evoluo tie.

Ĝis 1980 li estis prezidanto de nia Federacio, en sufiĉe tikla transira periodo. Kiel lia unua posteulo, mi volus substreki kiel valorajestis lia helpo kaj lia subteno.

D-ro Denoël ne nur estis honorigita kiel Honora Prezidanto de BEF, sed ankaŭ kiel Honora Membro de UEA, kie li ankaŭ laboris je la pinto, kiel estrarano.

Malaperis do je nia profunda bedaŭro homo escepte entuziasma kaj pionira de nia movado, ni havu dankan penson je lia memoro kaj daŭrigu la laboron .

M.Demonty

--------------

ESPERANTO EN BELGIO

Pro financaj kialoj la bulteno aperas nur post speciala decido de la estraro.



# BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

Estimataj,

Ni kore invitas vin ĉeesti la ĉi-jaran ĝeneralan kunvenon de BEF, kiu okazos sabate, la 28-an de novembro 1987 en la kunvensalonoj de la konata kafejo " FALSTAFF " je la teretaĝo de Mausstrato 25, 1000 Bruselo ( tel 511 98 77 ). Tiu kunvenejo troviĝas dekstre de la Borso, je cento da metroj de la pasintjara kunvenejo De Beurs. Ĝi estas facile atingebla ekde la Centra Stacidomo tra la Granda Placo.

Jena tagordo estas antaŭvidita :

- 10.00 - 12.30 : Estrarkunveno de BEF kaj de Klubo 100 .
- 12.30 - 14.00 : Tagmanĝo kun granda elektebleco surloke.
- 14.00 - 17.00 : Jarkunveno :
  - Honorigo de la mortintoj
  - Sekretariaj raportoj
  - Financa raporto
  - Raportoj de BEFA, ILEI, Klubo 100, SONORILO, Turisma Komisiono
  - Diversaĵoj
  - Malŝarĝo kaj elekto de nova estraro

Bonvolu sciigi antaŭe al iu estrarano, kiuj punktoj estas laŭ vi pridiskutotaj. Estu bonvenaj al la jarkunveno.

Nome de la estraro de BEF

PROTOKOLO de la ESTRARKUNVENO de B.E.F., okazinta la 8-an de novembro 1986 en Bruselo

---

Ĉeestas ( alfabete ) : J.Bovendeerd, M.Demonty, R. De Schepper, L.Drèze, I.Durwael, E.Ernst, G.Maertens, A.Mertens-Goossens, J.Verstraeten.

1) Financoj

- RDS raportas pri la financa stato de BEF, kaj atentigas pri la problemo de la ŝuldo al UEA. Pluraj opinioj esprimiĝas tiurilate,i.a. pro la pozitiva efiko de ŝuldoj en la librotenado.
- Ankaŭ menciindas la problemo de la lupago de BEF pro la nova sidejo en la Skotlandstrato. Pro la malĉeesto de L.De Bruyne ne eblas ĝisfunde pridiskuti la problemon. GM intencas trovi solvon por la kuranta jaro kaj poste rediskutigi la problemon.
- La rentumo de la fondaĵoj atingas ĉi-jare nur ± 25.000 BF. Aliflanke S-ino Ernst malavare proponas establi novan fondaĵon por la sumo de 250.000 BF. La estraro danke akceptas la proponon kaj komisias GM por administri la fondaĵon.

2) Elektoj de ĉefdelegito kaj peranto de UEA

Sekve al rezigno unuflanke kaj forpaso de F-ino Orsolini,al kiu la estaro esprimas omaĝon, tiuj du postenoj liberiĝis .

- Por la funkcio de ĉefdelegito kandidatiĝis G.Wybouw kaj G. Sossois. Pro diversaj konsideroj kaj kun sincera danko al S-ino Wybouw la estraro proponos la kandidatecon de Sossois.
- Kiel peranto de UEA elektiĝas RDS, post klarigo de diversaj timoj flanke de FEL pri la praktika funkciado, pri kiuj la estraro atentos.

3) Klubo 100

- pri la jubilea programo FEL atentigas pri la neceso de starigo de pli ampleksa patrona komitato, kaj lanĉas proponojn aplikeblajn en la franclingva parto.
- Estas lanĉita la propono de finjara festivalo en 87 por festi la 100-jariĝon de Esperanto. Pluraj homoj montras pretecon kunlabori.

Prot : MD .

PROTOKOLO de la Ĝenerala jarkunveno, okazinta samtage, je la 14-a horo en Bruselo

---

Ĉeestas : kiel matene + Laŭ enskribiĝa sinsekvo : Ges. Rouche, R.Jacobs,M.Grela,R.Van Herck, M.Decaluwe, R.Brabant, C.Bracke, P.Mouling, G.Jacques,R.Steenhout, L.De Sutter, G.Fichefet, M. Vereecken,E.D'hondt, Vandebergh J., M.Caestecker,K. k.A.Lödör, G.Sossois, B.larue, M. Cwik .

- La prezidanto bonvenigas la ĉeestantojn kaj proponas silentan momenton honore al la mortintoj de la jaro.
- La protokoloj estas aprobitaj.
- La raportoj de Ape kaj FEl esta laŭtlegataj. En la kadro de BEF GM atentigas la ĉeestantojn pri la nova fondaĵo Ernst.
- Financoj : La prezidanto dankas JV pro la multjara seninterrrompa laboro. RDS raportas pri la nuna situacio.
- Diversaj raportoj troveblas aliloke pri la agado de BEFA, ILEI, KONGRILO, Klubo 100 kaj la turisma komisiono.
- La Jarkunveno konfirmas la elekton de GS kiel ĉefdelegito , kaj ne definitivigas la elekton de la peranto de UEA.
- Diversaĵoj: M.Cwik informas pri iniciatoj kadre de la EK.

Prot : MD



A S O C I O   P O R   E S P E R A N T O

---

AGADO DUM LA PERIODO : 1.7.85 - 30.6.86

La pikniko organizita de la grupo el Charleroi okazis kiel kutime komence de julio, sed la loko ŝanĝis, tial ke gesinjoroj Paulus, nun grandaĝaj, estas malbonfartaj kaj ne plu povas akcepti nin en sia agrabla bieno. La ĉijara pikniko okazis en la komunuma parko de Monceau.

La universalan kongreson en Augsburg ĉeestis dudeko da APE-anoj.

Du trilandlimaj renkontiĝoj okazis, organizitaj de niaj germanaj (Stolberg) kaj nederlandaj (Maastricht) geamikoj. Kiel kutime, ĉirkaŭ 35-40 el niaj geanoj partoprenis ilin. Dum venonta aŭtuno, la renkontiĝo estos prizorgata de belga grupo (Liège).

Okaze de la renkontiĝo en Maastricht, la geesperantistoj de la tri regionoj partoprenis la Eŭropan Tagon. En Stolberg, estis elektitaj respondeculoj el la tri landoj por realigi eŭropan trilingvan propagandilon : 10.000 ekzempleroj estis disdonitaj en la trilima regiono.

La kasisto de APE reprezentis la asocion al kultura kunveno de SAT en Parizo, kaj 4 geanoj partoprenis la renkontiĝon de BEFA en Spa.

APE helpis finance la agadon de la grupo el Namur, pri la vizito de la junaj slovenoj en nian landon. Tiu vizito havis efekton en diversaj lokoj de nia lando, ĉefe en Valonio, sed ankaŭ en Bruselo kaj Flandro.

Kiel kutime, ni dediĉis malgrandan sumon al la Gazetara Servo.

Cetere, ni petis prikonversacion kun la deputito-urbestro de Plémalle, Sinjoro A. COOLS por interesigi lin al la grupeto de Plémalle kaj al la Esperanto-movado kaj akiri lokalon en komunuma lernejo por niaj kursoj.

KURSOJ : la nova kurso en Plémalle daŭras por perfektigi la samajn gelernantojn. Se ni ricevos la petitan lokalon, ni malfermos alian kurson por komencantoj. Nova kurso por komencantoj malfermiĝis la 18an/1/86 en Marche-en-Famenne; 25 personoj komencis ĝin. Bedaŭrinde, ni perdis plurajn pro la malbona vetero, speciale akra en tiu regiono. Tamen, 15 gekursanoj lernis ĝisfine. Por anonci tiun kurson, prelego de J.M. Derzelle okazis la 8an de januaro.

Ceteraj kursoj funkciis organizitaj de la grupoj :

CHARLEROI : vespera kurso ĉe Baha'i Societo - vespera kurso por plenkreskuloj en Hornu - perkoresponda kurso.

EUPEN : kurso por infanoj en la gimnazio.

LIEGE : vespera kurso por plenkreskuloj - perkoresponda kurso.

NAMUR : vespera kurso por plenkreskuloj - kurso por infanoj en katolika lernejo el Erpent.

SOUMAGNE : vespera kurso por plenkreskuloj.

VERVIERS : ĉiusemajna kurso (lundon vespere) en Radio-Barcarolle.

WELKENRAEDT : kurso por infanoj en la komunuma lernejo.

GAZETARA SERVO : la monata rubriko de G. PIRLOT daŭre aperas kaj la rebata servo funkcias. Tamen, tiu lasta iom lamis, ĉar, fine de junio, apenaŭ centon da artikoloj aperis en la franclingva gazetaro (en 1984, ĉ. 250 - en 1985, ĉ. 120).

EKSTERLANDAJ PRELEGINTOJ : en 1982, ni komencis serion da prelegoj de H. FRANK kaj C. PIRON, po unu ĉiusemestre; ni organizis seson el tiuj, sed ni devis ĉesi tiun agadon pro manko da sufiĉa mono.

RADIO-ELSENDOJ : regulaj elsendoj okazas en Olne kaj Verviers ĉe lokaj elsendejoj; cetere, membro el Hornu estis ankaŭ longe intervjuita.

ESPERANTO EN MARCHE : pro la malsano de A. Orsolini, ni konis malfacilaĵojn, tamen, ni sukcesis aperigi ses numerojn.

LA VIVO DE NIAJ GRUPOJ : ĉiuj grupoj regule kunsidas, organizas kursojn, kaj pluraj propagandas ekstere. Ĉefe la kluboj de Namur, Soumagne, Verviers, Welkenraedt. Ni menciu :

- Namur : akceptado de junaj slovenoj, kiuj, dum ĉirkaŭ 10 tagoj, vizitis nian landon;
- Soumagne : aperigo de multaj artikoloj en la gazetaro;
- Verviers : kurso por radio-elsendoj, kaj por komputilo; farado de antologio en Esperanto de belgaj franclingvaj aŭtoroj kaj tradukado de fremdaj verkoj.
- Welkenraedt : S-ino Grela partoprenis la Renkontiĝon de la Familioj, en Pollando. Krome, tiu grupo akceptas ĉiujare fremdulojn, plej ofte Polojn.

******************



Flandra Esperanto-Ligo
vlaamse esperantobond v.z.w
esperanto internationale taal

AKTIVECRAPORTO
al BEF pri la jaro 1985/86

Normale ke la ĝenerala agado direktiĝis al la jubilea jaro.

Speciala atento iris al la renovigo de la aspekto de nia movado cele al digna reprezentiĝo de la Esperanta societo kaj al atentokapta alfrontigo de la estonto.

Tiucele ekestis speciala laborgrupo pri instruado, informado kaj al tio ligitaj aliaj -adoj. Tiu komisiono, kunlabore kun FEL-estraro, priekzamenis la diversajn eblojn kaj ellaboris planon el kiu jam realiĝis kelkaj.

Ekzemple, post kontaktiĝo kun diversaj profesiaj reklamagentejoj, estas decidita - kaj jam efektivigita - nova FEL-stilo por ĉiuj niaj publikaĵoj, kiel leterpapero, kovertoj, broŝuroj, kursolibroj k.s. Alivorte, ĉio kion ni ekde antaŭnelonge produktas, aperos laŭ la sama bildo, kun la sama emblemo, laŭ la sama prezento.

La grupoj aliĝintaj al FEL estas insistepetataj uzi la saman stilon kaj, por tion ebligi, FEL faras specialan oferton per liverado je ekster-konkurencaj kondiĉoj de la necesa materialo.

Diversaj broŝuroj jam aperis en tiu nova vesto.

Rilate al la ĝenerala agado, FEL ankaŭ lanĉis konkurson intergrupan por pliaktigi la membronombron. Ĝis nun la membraro kreskis je 11 %. Pri la fina rezultato neestas eble raporti jam nun.

FEL ankaŭ proponis al siaj grupoj organizi specialan jubile-programon. Kelkaj jam akceptis, kvankam plej multe el ili preferus unutagan, amasan kaj kiel eble plej internacian festprogramon, ekzemple proksime de la Zamenhoftago. Do, ĉirkaŭ la 15-a de decembro. Rilate al tio, ni petis publikigon de artikolo en Heroldo de Esperanto kaj en ESPERANTO de UEA, dum ni ankaŭ dissendis leteron al la landaj asocioj de Eŭropo.

Krome ni decidis organizi studotagon por instruantoj kaj kadrokursojn

pri Parolteknikoj (Publikaj - ), Kunventeknikoj kaj pri Interhomaj rilatoj (Transakcia Analizo), laŭ la sama skemo kiel la kadrokurso-serio kiu jam okazis en la jaroj 1981/82.

Kiel verŝajne jam sciate, FEL ankaŭ transprenis la eldonejon STAFETO kaj ties librorondon. Aperis jam unua verko, nome "Ĉu rakonti novele" de Johan Valano, sekvota de verko de Waringhien kaj poste verŝajne de nova romano de Deck Dorval.

Ni ankaŭ ne forgesu, ke la delonge atendata vortaro Esperanto-Nederlanda-Esperanto (Prisma-) finfine aperis kaj disvendiĝas ankaŭ en la ĝeneralaj librovendejoj.

" 't Spectrum" ankaŭ promesis - kaj jam faris - lanĉi en la librovendejojn nian mem-studo-kurson ESPERANTO PROGRAMITA.

Ekspozicioj okazis en GB/INNO, BM en Antverpeno okaze de ĝia 100-jara ekzisto. Tio okazis de 03 - 19/10/1985. Aliaj okazis en Antverpeno (Naturborso), Genk, Hasselt, Tongeren, Gent k.a. Je tiuj okazoj la ekspoziciantoj povis uzi la novan ekspozicimaterialon de FEL.

Rilate al turismo, P.J. van Duijne el Middelburg ellaboris planon por kampadantoj/kampademuloj kaj diskonigis tion kunlabore kun FEL kaj pere de ties novajbulteno.

Nia Turisma Servo, kiu kunlaboras kun tre grava entrepreno (VTB/VAB) ankaŭ organizas ĉiuspecajn vojaĝojn kaj feri-eblecojn. Por la jubilea jaro, tiu sama servo preparos grupvojaĝon al la jubilea UK en Varsovio.



Rilate al kongresoj, FEL ne organizos kongreson en 1987 por ne konkurenci aliajn, nun Nederlandon. Ni jes proponis al ĉi lasta estonte organizi kongreson alterne ĉiun duan jaron. Ni tamen ne certas ĉu la Nederlandanoj akceptis. Kiel ajn estu, ni pretas propagandi ilian pere de nia novaj-bulteno.

Serve al niaj Flandraj kongresoj, ni preparis kongresregularon.

Pli ĝenerale, ni povas ankaŭ mencii ke la Kortrijka grupo LA KONKORDO komence de ĉi jaro, festis la 60-jariĝon de sia grupo. Sekve al tiu festado ili altiris 40-on da novaj lernantoj al sia kurso.

Laŭdindan iniciaton prenis la Antverpena LA VERDA STELO organizante 4 intergrupajn programojn jare, nome je ĉiu 5-a vendredo de tiuj monatoj kiuj nombras 5 semajnfinojn.

Kaj nia Liga bulteno ESPERANTO PANORAMA aperigis sian 100-an numeron en julio ĉijare.

Por fini, ni volus proponi al BEF kaj APE, aŭ fakte al ĉiuj belgaj Esperanto-organizoj, adapti sian socian stilon, sian eksteran aspekton, do, al la nia por tiel unuformigi la bildon de Esperanto tra la tuta lando.

JB.

## BELGA ESPERANTO-FEDERACIO - KOMISIONO PRI TURISMO - 1986

- Komisiono pri Turismo kadre de B.E.F. establiĝis la 1-an de februaro 1986. Gia ĉefa celo estas la aplikado de esperanto en la turismo ĝenerale, konforme al la statuto de Monda Turismo; intertempe tiu statuto estas leĝe registrita en Belgio la 26-an de marto 1986 sub formo de laŭ la belga leĝo tiel nomata "asocio senprofitcela" (sama formo kiel ekzemple Grafika Centro Antverpeno).

- Sekve de du komisionkunvenoj (la tria planita por junio ne okazis sed estas prokrastita ĝis la 8-an de novembro 1986), ni decidis i.a. traduki la informbroŝuron de U.E.A. "La lingva problemo en turismo" en nederlandan kaj francan lingvojn, ĉar ni opinias ke ĝia valora enhavo nur havas sencon se ĝi povas esti distribuita kaj diskonigita enlande.
- Pere de Leo De Bruyne, la komisiono havas kontaktojn kun la Internacia Akademio pri Turismo en Monako, kiu fondiĝis en 1951 kaj i.a. eldonas turismajn terminarojn. Ni decidis aboni la revuon de la Akademio, aĉeti la francan (kiu estas la baza) terminaron kaj eventuale proponi al la Akademio eldonon de la terminaro en esperanto. Tiurilate mi deziras aparte mencii ke de tiu turisma fakvortaro en la franca lingvo, ekzistas aktualaj eldonoj i.a. en la nederlanda kaj hispana lingvoj, estas adaptitaj la angla kaj la itala eldonoj kaj krome greka, jugoslava (serba-kroata) kaj araba eldonoj estas prilaboritaj.
- Sekve al turisma agado kaj kontaktoj kun la instancoj kaj ambasadejoj, komenciĝis intertraktado pri interfratiĝo de Bankja (Bulgario, apud Sofio) kaj la samspeca mineralfonta urbo Spa (Belgio). Pro administraj malfacilaĵoj la Bulgara delegacio ne povis veni al Spa je la fino de aprilo 1986 kiel planita, sed ekzistas novaj planoj kaj proponoj por interfratiĝo en la estonteco.
Kvankam simila agado ekestis en urbo Gent (Belgio) por interfratiĝo kun pola urbo, la urbestraro metis la planojn "en la glaciŝranko" sed fondiĝis Flandra-Pola Komerca Ĉambro (kun propra tradukservo). Sekve de tio Pollando estos gastlando de la Internacia Jarfoiro en Gent, septembro 1987, kaj en la aŭtuno 1987 estos en Gent grandega ekspozicio kun la 16-jarcentaj flandraj murtapiŝoj el la Wawelkastelo de Krakovo.
- La komisiono akiris liston de la belgaj reprezentantoj ĉe internaciaj organizaĵoj, i.a. ĉe la M.T.O.
- Ekzistas planoj por kontakti kaj enpenetri la oficialajn turismajn instancojn kaj la priturisman gazetaron en Belgio. Ĉi tiuj planoj estas tamen malfacile realigeblaj pro la federaciiĝo de multaj (sed ne ĉiuj) naciaj instancoj. Dum sekvonta kunveno ni devos i.a. cerbumi pri strategiaj manieroj tiurilate.

Monique Caestecker
septembro 1986.



JARRAPORTO DE B.E.F.A. POR 1986.

B.E.F.A. organizis en 1986 la Komunan Ĝeneralan Jarkunvenon de BEFA kaj de FERN (niaj nederlandaj kolegoj) en la feria domo "Sol Cress" de SPA. 80 partoprenantoj; inter ili 17 nederlandanoj, 11 germanoj, 5 francoj, 2 britoj kaj 1 polo. Venis delegacio de APE, sed neniu de Fel nek de BEF.
Sabaton la 19an, du aŭtobusoj kondukis nin tra la belgaj ardenoj, kaj vespere, la urbestro de Spa venis en le feria centro por saluti la kongresanoj. Sonorilo melfermis libro-butikon.

B.E.F.A. partoprenis en
- la 38a IFEF-Kongreso en Skopje (YU) de la 17a ĝis la 23a de majo. 715 partoprenantoj el 20 landoj.
- la ĝenerala jarkunveno de F.F.E.A. (niaj francaj kolegoj) en Parizo, de la 26a ĝis la 28a de septembro.
- la ĝenerala jarkunveno de G.E.F.A. (niaj germanaj kolegoj) en Duisburg, de la 17a ĝis la 19a de oktobro.

En la 71a Universala Kongreso de Pekino, la Prezidanto de BEFA, kiel ĉefkomitatano de I.F.E.F., gvidis la fervojistan kontaktkunvenon; 51 partoprenantoj el 15 landoj, 4 kontinentoj. Sekvis aliaj fruktedonaj kontaktoj kun ĉinaj fervojistaj kolegoj, el kiuj oni povas konkludi ke Ĉinio fariĝos la 20a IFEF landa sekcio.

Esperanto-kursoj.
Krom la perkorespondaj E-o kursoj, B.E.F.A. organizis de oktobro 85 ĝis aprilo 86, buŝan kurson en la konferencejo de la stacidomo de Bruselo Norda, 2 sabatoj po monato.
Depost oktobro 86 kaj ĝis fine de marto 87, B.E.F.A. organizas 2 konversaciajn kursojn, unu por komencantoj kaj unu por progresantoj, en 2 konferencejoj de la Centra Direkcio de la belgaj fervojoj, denove 2 sabatoj po monato de la 10a ĝis la 12a horo.

I.F.E.F.-Terminara Komisiono.
B.E.F.A. kunlaboras en la IFEF-Terminara Komisiono por la tradukado en E-o de la Leksikono de la fakaj terminoj de U.I.C. (Internacia Unuiĝo de la Fervojoj).
Por la ne-fakuloj - Tiu leksikono entenas proksimume 12000 fervojaj fakaj terminoj tradukitaj en ses lingvoj: la franca, la germana, la angla, la itala, la hispana kaj la nederlanda.

En 1987, B.E.F.A. festos sian 35an datrevenon kaj la 39a I.F.E.F.-kongreso okazos en Katovice (PL) de la 16a ĝis la 22a de majo.

La Prezidanto,

L. DE SUTTER.

# KLUBO 100

Listo rekte donacintoj          Elspezoj          Listo donacintoj konto FEL

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

Tot. saldo kontoj 67531±? Saldo bankkonto 42531 Saldo konto de FEL 25000±?

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1986 | VANDEBERGH Jos | 1000 | **Eùropo Esperanto** | -4500 |
| | TORFS-DE LEEUW Jan | 1000 | | |
| | DE CAESTECKER Mon | 1000 | | |
| | BRACKE Clara | 1000 | | |
| | DE ROOVER H | 200 | | |
| | BankinterASLK/CGER | 2063 | | |
| | Imposto | -516 | | |
| 1987 | DELHAYE Robert | 1000 | **Eùropa Festivalo** | -2203 |
| | MOLS Karel | 1000 | **Eùropa Festivalo** | -555 |

Tot. saldo kontoj 68020 Saldo bankkonto 43020 Saldo konto de FEL 25000±?

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| BEF enspezis | 50278 | elspezis | 7258 | havas ankoraù | 43020 |
| FEL enspezis | 25000±? | elspezis | ? | havas ankoraù | 25000±? |
| **KLUBO 100 enspezis do** | **75278±?** | **elspezis** | **7258±?** | **havas ankoraù** | **68020±?** |

? = La ciferoj estas kompletigotaj per la kontoj de FEL

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

$$ Subtenu la landan Esperanto-movadon $$

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

## DANKESPRIMOJ

Ĉi-jare ni ŝuldas specialan dankesprimon al pluraj personoj pro ilia gravega kontribuo :

- Al JULES VERSTRAETEN , apartan kaj varman dankon pro lia mult-jara formika, kvazaù monaĥa, sindonema laboro por la bono de nia kaso, kiu nur dank'al lia persona engaĝo restis malgraù ĉio ekvilibrita. Jules daùrigas per aliaj talentoj sian karieron en nia movado, sed certe meritos krome resti nia " honora kasisto " .
- S-ino ERNST dalonge estas aktivulino ĉefe en la kadro de la brusela grupo, sed ankaù famiĝis en la internacia movado. En 1986 ŝi refoje faris grandan donacon al la movado, permesante establi novan fondaĵon, kiu portos ŝian nomon.
- Nia sekretario A. MERTENS-GOOSSENS ankaù valore kontribuis al la financa ekvilibro per signifa donaco, kaj daùrigos tiun subtenon en 1987.

Al ĉiuj koran dankon pro la specifa kontribuo !

MD